

## KIAL ISLAMANOJ IĜAS TERORISTOJ

*La bomba atenco en londona metroo estis dume deka terorista atako kun islama fono post la 11-a de septembro 2001 kaj post Madrido dua en Eŭropo. En kio kaŝas sin la kaŭzoj de tiu teroro? Ĉu ekzistas iuj eblecoj iamaniere ĝin malebligi? Al tiu demando respondas eksperto je islamo Eberhard Toeger.*

Post teroristaj agoj, kiuj iras sur la konton de la islamanoj, tiel kiel evidente tiu el ili en Londono, emfazas politikistoj kaj same ankaŭ oficialaj reprezentantoj de la islamo, ke la islamo estas esence pacama kaj la teroristoj agas malakorde kun ĝi. Neniu kuraĝas publike konfesi, ke la islamo estas ekde sia ekesto militanta religio kaj socia ordo kaj tiun ĝian militantecon subtenas kaj Korano kaj literaturo pri la vivo de Mohamedo. La militantaj tekstoj en la Korano (kiel ekzemple versio 9,5, en kiu tekstas: „Mortigadu nekredantojn, kie ajn vi ilin trovos, ekataku ilin, sieĝu ilin, embusku ilin ĉie!“ kaj la vivo de Mohamedo inspiris dum tuta tempo la islamanojn al la batalo kaj estas neniu sekreto, ke hodiaŭ la islamaj predikantoj kaj ekstremisma literaturo inkluzive de interreto alvokas la islamanojn al tiu batalo.

### Mohamedo kiel modelo

Apartenas en la islamo al ĝenerale akceptata konsento, ke Mohamedo estas granda modelo de la vivaranĝo por la islamanoj. Mohamedo estis implikiĝinta en multajn armitajn batalojn, kiujn li mem pravigadis per permeso kaj ordono de Alaho mem. Por la islamano estas armita kaj eĉ nearmita batalo por Alaho „sankta milito“ (ĝihado). Sed inter la islamanoj daŭras konflikto, kiom la ekzemplo de Mohamedo povas esti transportata senpripense en la hodiaŭan mondon. Iuj opinias, ke la armita batalo estis por Mohamedo nepre necesa, por alkonduki lian heroldadon al la venko. Sed en la moderna mondo laŭ ili devas la islamo esti disvastigata per propagandistaj, politikaj kaj ekonomiaj rimedoj, por atingi sian celon, kaj ĝihado estas mem batalo kontraŭ malbono en la mondo kaj en la homo. Sed

tiun novigon la fundamentalistaj islamanoj rifuzas. Laŭ ili tio, kio validis por Mohamedo, validas ankaŭ nuntempe. Sed la plejmulto el la fundamentalistoj opinias, ke la batalo kontraŭ malamikoj de la islamo devas okazi nur el flanko de la registaroj de la islamaj landoj kaj nur kun konsento de la islamana scienculoj.

### La vojo al islama teroro

La mahometanaj teroristoj pretendas al si la rajton je armita batalo propracede kaj rifuzas necesegan konsenton de la jurvalidaj instancoj. Por tion kompreni, etas bezonata enrigardo en la historio de la bataloj de Mohamedo. Mohamedo batalis en Medino kaj poste el Medino en kvar frontoj: 1. Kontraŭ siaj paganaj malamikoj en Mekko, kiuj rifuzis la islamon kaj persekutis Mohamedon. 2. Kontraŭ judaj etnoj en Medino, kiuj rifuzis aliĝi al li kaj kritikis lin. 3. Kontraŭ arabaj „blasfemuloj“ en Medino, kiuj sin aligis al Mohamedo nur oportu-nisme kaj en kritikaj situacioj forlasis lin. 4. Kontraŭ kristanaj regantoj en Jemeno kaj kontraŭ Bizancio, kie volis Mohamedo toleri judojn kaj kristanojn nur kondiĉe, ke ili subigos sin sub lian regadon. „Ĝihadistoj“ transprenas tiun batalon senkritike al la estanteco. En materialismigita kaj seksualizita Okcidento oni vidas paganecon el iama Mekko. La islamana regantoj kaj scienculoj, kiuj pakumas kun Okcidento, estas laŭ ili blasfemuloj el Medino. Sionismo estas konforma al judoj el Medino kaj iliajn aliancinojn ili konsideras kiel posteulojn de la bizanca regno.

### Legitimaj bomboj

Plejparto de la politikistoj kaj scienculoj estas laŭ ĝihadistoj koruptigitaj, kaj tial

por veraj islamanoj, je kiuj sin ĝihadistoj kosideras, restas nenio ol preni la batalon en siajn manojn. Ĉar ili estas malplimulto, kiu batalas kontraŭ fortosupereco de la malamikoj, ili opinias bombajn kaj mem-mortigajn atakojn kiel rimedon, kiu estas laŭ Alaho tute legitima. Ankaŭ Mohamedo konsentis kun insidaj atakoj kontraŭ siaj potencaj malamikoj. Ĝihadistoj do volas konscie sekvadi Mohamedon kaj pravigas sian teroron per lia ekzemplo. Tial estas naiva supozoj, ke la ĝihadistoj finigos sian batalon, se usonanoj kaj iliaj aliancanoj sin retiros el islama mondo. Ilia ĉefa malamiko estas Okcidento pro ĝia sendieca kulturo, kiun ĝi disvastigas pere de mediatroj ankaŭ en islamon mondon. Sed ankaŭ la koruptitajn islamajn regantojn estas necese likvidi kaj submetigi ĉiujn kristanojn kaj judojn sub la islamon superregadon. La ĝihadistoj havas longtempajn celojn, kiuj respondas al la celoj de la malnova islamon. Estas do granda

eraro vidi en la ĝihadon nur kelkajn araneojn, kiuj renversas aŭtentikan islamon.

Ĉu ekzistas ebleco fari finon al la islamana teroro?

La ŝtataj kaj la sociaj sekurigaj aranĝoj estas certe bezonataj, por ke la terorismo estu limigita, sed ili mem ne sufiĉas, ĉar la kerno de la problemo estas en Korano kaj en ĝiaj militantaj tekstoj kaj ankaŭ en imitado de Mohamedo. Aŭ la islamana militarismo finos nur tiam, ĝis la islamanoj realigos sian tutmondan hegemonion, aŭ ĝis la tutmonda islamon rezignos pri siaj politik-armeaj celoj. Nek la unua nek la dua estas nuntempe konsiderata kiel ebla. La mu-zulmana superregado ne estas ĉi-momente vidodistanca kaj la samo validas pri la ebla rezigno je esenca parto de Korano kaj gravaj momentoj el la vivo de Mohamedo. Tial la fino de la islamana perfortoj ne estas vid-atingebla. ■

*(Laŭ Kath-net aperis en Světlo 31/2005)*